Rusio: respondo al sankcioj de Usono kaj la Eŭropa Unio.

La registaro de la rusa prezidento Vladimir Putin reagis forte al la punoj altruditaj de la usona administracio de Barack Obama kaj ties eŭropaj aliancitoj (UE) kiuj klopodas sieĝi Moskvon, uzante la ukrainian reĝimon.
Kiel reago, Putin ordonis limigojn en la importado de diversaj agrikulturaj kaj nutraj produktoj devenantaj el Usono kaj Eŭropo, kio damaĝos la malfortajn ekonomiojn de la Eŭropa Unio, kiu travivas unu el la pli fortaj krizoj de sia historio.
Pluraj spertuloj opinias ke ŝajnas kvazaŭ Vaŝingtono kondukus siajn “amikojn” de la Eŭropa Unio al abismo por malfortigi ilin kaj poste ĉantaĝi ilin, depost spionadi kaj utiligi ilin en siaj invadoj kontraŭ Libio, Irako kaj Afganio.